

AVENO #42 - **Homaj Rajtoj**  
Januaro - Decembro 2016

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, ... sh + u.

Ligoj:

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/>

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

==

2016-11-24 Torto en rusia pun-gulago ? Ne, Torturo.

Ildar Dadin, kantisto, unua kondamnito en Rusio pro manifestacioj (kontrau la politiko) estis kondamnita unue al 3 jaroj, poste reduktita je nur 6 monatoj. Li trovighas en gulago n-o 7 en Karelio, kaj tie estis severe torturita - laŭ informoj de lia edzino, de Amnestio Internacia kaj Open Russia, kiu citas aktualajn informojn.

<http://www.khodorkovsky.com/torture-as-routine/>

Komento AVE/mw: Mi rememoras la rakontojn de Lev Kopelev pri la tempo post 1945 - simile kruela traktado de malliberuloj, aparte de politikaj.

==

2016-11-12 P.R. Chinio batalas kontrau la budhismo

Mi ricevis pet-leteron de germana por-Tibeta asocio ( Tibet-initiative.de ), kiu plendas kontrau la detruo de budhisma instru-centro Larung Gar en orient-Tibeta Serthar (entute 1.500 konstruajhoj) kaj forpelo de 1.200 ge-monahhoj, kiuj ne plu rajtas eniri iun ajn monahhejon (en Chinio) se ili ne estis foririnte "libervole".

AVE delonge subtenas la klopodojn de tibetanoj por religia libereco.

Jen la ret-ligo: <http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/tibeto.htm>

(ankau atingebla de [verduloj.org](http://www.verduloj.org) > dokumentoj > mondo > Azio )

Dum la UK en Pekino 2004 tibetaj studentinoj prezentis fokloran dancon; iu diris, ke ĉinaj organizantoj preferus ke ili kantas: ... pri ilia amo al Ĉinio !

Feliĉe ke tio ne okazis. Mi rememoras, ke mi en 2004 iomete ghenis chinajn UK-respondeculojn parolante favore al vera autonomio de Tibeto.

Necesas aldoni ke ankau aliaj religioj estas sub china influo. Ekzemple ekzistas 2 katolikaj eklezioj en Chinio, la tutmonda de la Papo kaj tiu de la China registaro.

==

2016-10-10 Kuracistoj sen limaj & kiel eviti militojn

Mirejo tradukis la prelegon de belga eks-ministro, eks-prezidanto de

**Kuracistoj sen Limoj**, S-ro **Moreels**. Li faris tiun prelegon en Oostende okaze de la ILEI-Konferenco en 2015. Vi trovas la tekston sur nia retejo: [verduloj.org](http://www.verduloj.org)

==

2016-07-16 Esperanto che UN - pri indigenaj popoloj

Stefano Keller, ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, ĉeestis la 9-an sesion de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP, 11-15 julio 2016). Keller intervenis pri la tagorda punkto 7: La celoj de la daŭripova evoluo kaj la rajtoj de indiĝenaj popoloj. Li atentigis pri la signifo de konoj de indiĝenaj popoloj pri naturo kaj la konservado de la vivdiverseco, kiuj estas pluportataj per iliaj lingvoj. Li substrekis, ke la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj.

Li citis partojn de la Deklaracio de la 64-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj, organizita de UN en Bonn, Germanio (2011), pretige al la konferenco "Rio+20". Tiam, Keller sukcesigis kun sia teamo akceptigi en pluraj frazoj de la Deklaracio ĉiujn proponojn de UEA pri lingvaj rajtoj kaj

Esperanto, eĉ du kompletajn alineojn, el kiuj li citis la jenan: "Ni alvokas pri la respekto kaj inkludo de la etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj entenas informojn pri la komplekseco de la naturĉirkaŭaĵo, kaj alvokas pri la konsidero de la ebleco utiligi neŭtralan internacian lingvon, facile lerneblan."

Li subtenis la intervenojn de aliaj reprezentantoj, kiuj parolis pri la graveco de gepatralingva edukado kaj pri la malrespekto de lingvaj rajtoj de indiĝenoj. En la tutsemajna sesio, per diverslingvaj informiloj, en personaj kontaktoj kaj en sia alparolo, Stefano Keller zorgis pri abunda informado pri UEA, Esperanto, la Esperanto-Tago, lingva justeco kaj la 101-a UK.

Ligilo al la dokumento en 6+1 lingvoj: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/#EMRIP9>  
--

2016-09-23 Smolensk - ĉu propagando-filmo ?

Sufiĉe ofte ĉi-tie temas pri rusia fi-propagando.

Jen shajnas, ke la pola registaro misuzas filmon por morale „batali“ kontraŭ Rusio.

Temas pri la krasho de pola registara aviadilo 2010-04-10 proksime de Smolensk.

Tiam mortis kune kun la pola prezidento L.K. 95 homoj, multaj el ili politikistoj.

La plej vershajna kauzo: estis densa nebulo, kaj la prezidento volis nepre surterenighi tie, kaj ne sur iu alia flughaveno.

Sed delonge - kaj nun per filmo - la dekstrema registaro preferas kredigi ke Rusio kaŭzis la krashon: <http://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-216689.html>

Vi trovos informojn ankaŭ sur wikipedio.

-

2014-07-17 / 2016-09-28 MH 17 estis pafita de rusa BUK, el separatista regiono

Tion finfine deklaris la komisiono kiu esploris la faktojn.

Mortis preskaŭ 300 homoj plejparte el Nederlando; Rusio ankoraŭ hezitas akcepti sian parton de la kulpo (almenau ke oni donis tian armilon al ne-fakuloj).

La BUK estis re-transportita al Rusio tuj post la katastrofo.

Bonvolu sekvi la informojn en wikipedia.org

==

2016-09-22 Alternativaj Nobelpremioj 2016 el fondajho de Jakob von Uexkuell

2016 ghi honoras 4 homojn au grupojn kiu aktivas por la Homaj Rajtoj

**Blank-Kaskuloj** (Syria Civil Defense) kiu helpas post la bombado trovi la homoj sub la rompitaj konstruaĵoj. Ili ankaŭ instruas la homojn protekti sin efike.

**Cumhuriyet**, la turka gazeto kiu malgrau subpremo de la reghimo raportas pri fi-faroj de la regantoj.

**Moza Hassan**, ŝi fondis „Nazra por feminismaj studoj“, kaj subtenas la samrajtigon de virinoj en Egipto.

**Svetlana Gannushkina**, ŝi fondis „Civid Assistance Committee“ kiu subtenas rifughintojn

aparte el centra-aziaj landoj por ke ili ne estu re-sendataj tien, kie la reghimo fi-traktos ilin. Multaj el tiuj ricevis la rusan shtatanecon al al tiu iniciativo.

Pli detalaj informoj en la germana: <http://www.tagesschau.de/ausland/alternativer-nobelpreis-115.html>

Jen la retejo en 8 lingvoj: <http://rightlivelihoodaward2016.org/>

= =

2016-09-19 Moskvo - elektoj por Duma ne tute puraj

Formale la elekto de nova Duma-parlamentanoj estis preskaŭ en ordo; mi audis raportojn pri malfacilajhoj por la kandidatoj kaj partioj (ekz-e malbona ebleco sinprezenti en publika TV, k.a.), kaj jam klaras ke kelk-loke okazis frauda voĉdonado.

Pozitive estis ke inter la akceptitaj 14 partioj la libere kaj ekologie pensantaj Jabloko kaj Parnass ne batalis unu kontraŭ la alia. (informo i.a.: dradio.de)  
Ekzistas espero por Rusio.

2016-09-11 Turkio jhetas 24 au 28 kurdajn urbestrojn – elektitajn de la civitanoj.  
La nuna turka prezidento shanghas la landon de demokratio al prezidenta diktaturo.  
Kompreneble la civitanoj manifestacias ...  
<http://www.tagesschau.de/ausland/tuerkei-buergermeister-101.html>

Jen la sama informo en Deutsche Welle, trovebla en multaj lingvoj:  
<http://www.dw.com/en/turkey-removes-24-mayors-over-links-to-kurdish-rebels/a-19543025>

En mil-obla kvanto la registaro maldungis instruistojn kaj profesorojn (k.s.), ekzemple- se ili subskribis peticion favore al Ronda Tablo kun la kurdoj. Jen koncize en germana radio dradio.de:  
[http://ondemand-mp3.dradio.de/file/dradio/2016/09/11/saeuberungen\\_in\\_der\\_tuerkei\\_treffen\\_nicht\\_nur\\_dlf\\_20160911\\_1826\\_bcb38d08.mp3](http://ondemand-mp3.dradio.de/file/dradio/2016/09/11/saeuberungen_in_der_tuerkei_treffen_nicht_nur_dlf_20160911_1826_bcb38d08.mp3)  
--

2016-09-11 Jhurnalistoj en Rusio – veron ne shatas la Nomenklatur-anoj.  
Ekz-e Mihhail Afanasev estis multfoje antaŭ la jughistaro, ĉar li publikigas ne-agrablajn por la moshtoj informojn.  
Ekz-e, ke la milit-milistro Shojgu estas kvazau shtelchastisto, ĉar li – kun „samideanoj“ - chasas en naturprotektita areo; kie normalaj homoj ech ne rajtas pluki florojn.  
Pli pri tio en germana TV: <http://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-214313.html>

= =

2016-09-08 Siegho de Leningrado dum 2,5 jaroj komencis antaŭ 75 jaroj  
Pro la siegho kaj obusa pafado de la germana armeo mortis 1,1 milionoj plejparte pro malsato.  
Nuntempe simila okazas en Aleppo – pro bomboj de la registaro kaj finfine de rusaj aviadiloj. La celo estas regajni la urbon por la registaro de Assad.

= =

2016-08-02 PR Chinio pretendas grandan maran teritorion  
la popola respubliko de Chinio estas ekonomia giganto, kaj opinias, ke ili „posedas“ la t.n. orient-chinan maron. Temas pri libera maro en duobla grandeco de la Mediteraneo, kiu situas post la 200-mejla zono kiu apartenas al la bordaj landoj.  
La najbaroj (Vjetnamo, Malajzio, Brunei, Filipinoj, kaj Tajvano) malakceptis. Kaj petis la Internacian Arbitracio-Kortumon: tiu decidis ke PR Chinio ne pravas.  
Bedaurinde Chinio - malagrabla najbaro - ne akceptas la verdikton, sed ekzercis milit-manovron tie. Krome ili detruis koralajn rifojn por konstrui teritorion ene de la internacia mara teritorio.  
Mi skribas denove pri tio, ĉar mi trovis pli detalajn informojn (en la germana):  
Teksto: <http://www.tagesschau.de/ausland/china-ostchinesisches-meer-101.html>  
Video: <http://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-198699.html>

= =

2016-07-19 Naciismo & Fundamentalismo kreas teroron – Turkio, Chinio, tutmonde (eta komento pri la lastaj okazajhoj)\*\*  
la prezidento de Turkio uzas la t.n. puĉo por „ordigi“ la landon – kiu ne sekvas lin, aparte de alia etno, opinio au kredo estas en danghero. La intenco denove enkonduki la mortpunon en Turkio, jhetos la landon ekster la EU-proksimeco (la lasta ekzekuto okazis 1984, la mortpuno estis nuligita). La laicistaj atingoj de Mustafa Kemal (patro de la turkoj) malaperos, Turkio similos al Uzbekio, ktp..  
Pozitiva demokratia ekzemplo - ene de la turk-lingvaj landoj – shajnas esti Kirgizio.

Pli danghere ol prezidenta diktatoreco estas la sekvantoj de la t.n. Islama Shtato – kiu

efike varbas psike malfortajn homojn - jhetas teroron super la tero.  
... Francio, Belgio, Orlando, Nico, nun en Bavario (afgana junulo atakis pasagerojn en trjano) , ...

Nenie oni sentu sin sekura, se vi ne 100%-e sekvas la malsanan ISo-ideon.  
Eble iu de vi, karaj legantoj, havas/konas verkon kiu klare priskribas ilian vizion.

Sed ankau Chinio ghenas la najbarojn, postulante la rajton al grandega mara teritorio.  
La Internacia Arbitracia Kortumo en Den Hago decidis ke la historiaj streketoj sur iu mapo ne validas, kaj ke necesas paca diskuto sur Ronda Tablo inter la najbaroj. Sed Chinio ne akceptas tion. EU petas Chinion sekvi la IAK kaj trovi pacan interkonsenton.

\*\*\*) Pardonu - se vi enuas pri tiaj kruelajhoj, bonvolu malstrechighi legante „Bonajn Novajhojn“ - en la angla, itala kaj portugala. [www.goodnewsagency.org](http://www.goodnewsagency.org)  
Dankon al Renee, kiu montris tian pozitivan flankon de la mondo.

= =

2016-07- 05 274 indighenaj lingvoj parolataj en Brazilo  
Hodiau estis jhus publikigitaj nova studo de la Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko (IBGE), kiu faris la popol-nombradon kaj klasifikon de la brazilaj indighenaj popoloj. La rezulto de tiu grava studo estas surpriziga: 305 etnioj kaj 274 lingvoj. Por havi ideon, oni kalkulas ke la europaj lingvoj parolataj hodiau estas chirkau 140. La nombro de indighenoj en Brazilo estas 900.000, dum la tuta brazila popolo konsistas el 190 milionoj da homoj. Tio signifas, ke estas vere malgranda grupo da homoj parolante tiom da lingvoj. La studo montras la richecon de la kultura diverseco de Brazilo, sed ankau la defion protekti ghin kaj garantii la respekton al la lingvaj rajtoj de tiuj indighenaj popoloj:  
Novajho en la portugala:

<http://g1.globo.com/natureza/noticia/2016/07/305-etnias-e-274-linguas-estudo-revela-riqueza-cultural-entre-indios-no-brasil.html>

Novajho en la angla:

<http://plus55.com/culture/2016/07/knowing-brazilian-indigenous-populations>

Faldfolio de IBGE pri la indighenaj lingvoj kun interesa tabelo:

[http://indigenas.ibge.gov.br/images/pdf/indigenas/folder\\_indigenas\\_web.pdf](http://indigenas.ibge.gov.br/images/pdf/indigenas/folder_indigenas_web.pdf)

Amike, Alvaro (kiu kunlaboras en kadre de Rio+20+x )

Kuriozajho: La fondinto de IBGE (Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko), Mário Augusto Teixeira de Freitas, estis tre grava esperantisto. IBGE estas la oficiala departemento pri Statistiko de Brazilo kaj estis fondita en 1934.

-

Oficiala ret-paĝo de RIO+20: <http://www.uncsd2012.org/rio20/>

= =

2016-06-17 Amo konkeros la malamon.

Ek de la bibliaj (prahomaj) tempoj homoj atakis & mortigis unu la alian ne nur pro manghajho kaj povo super reala teritorio, sed ankau pri kulturaj aferoj. Kreitaj kulturajhoj (religio, sociala konduto) taugas por kunteni socialan grupon, sed kiam temas pri diversaj grupoj kaj diversaj opinioj ofte el malkomprenemo kreskas malamo kaj murdo.

Tion ni vidas nun tutmonde, "dank' " al plibonigitaj teknikoj, en nekompreneblaj kruelajhoj:

- la plej lastaj estis la murdo al la brita politikistino kiu defendis la EU-apartenon de Granda Britio;

- la oftaj "amok" pafatakoj en Usono (la lasta en Orlando);

- la kruelajhoj de la "Islama Shtato", "Boko Haram" kaj similaj;

- la kruelajhoj (murdo, humiligo, malliberigo) kontraŭ opoziciuloj en Filipinoj, Sirio, Meksiko, Rusio, ktp.

Jes, ankaŭ ekzistas pozitivaj evoluoj rilate komprenemon - ni esperas, ke tiamaniere eblas redukti la morto-krean malamon.

Bondezirojn, ni agu pace por racia, homarana kunvivado, amike, manfred

Betreff: [Esperanto RIO+20] Lingvaj Rajtoj: 40 jarigho de la Ribelo de Soweto

Datum: Fri, 17 Jun 2016 00:50:09 -0300

Von: esperantoRJ <[alvaromotta@gmail.com](mailto:alvaromotta@gmail.com)>

2016-06-16 Ribelo en Soweto 1976 pro malrespekto de Lingvaj Rajtoj

Karaj, hodiaŭ la 16-a de junio estas la 40-a datreveno de la Ribelo de Soweto, kiam centoj da nigraj infanoj estis mortigitaj en Sud-Afriko pro la simpla fakto, ke ili protestis por defendi siajn lingvaj rajtojn. Tiam, la reĝimo de Apartheid volis devigi ĉiujn nigrajn infanojn esti instruista en Afrikaans, la lingvo parolata de la blanka minoritato.

La 16-a de junio estas tre grava tago por lingvaj rajtoj, same kiel la 21-a de februaro (Internacia Tago de Gepatra Lingvo).

<http://www.dw.com/en/remembering-soweto-40-years-on-educational-inequality-remains/a-19332019>

<http://www.dw.com/pt/desigualdades-persistem-40-anos-ap%C3%B3s-revolta-do-soweto/a-19335706>

Mallonga video pri la Ribelo de Soweto kaj Sud-Afrika himno (Nkosi Sikeleli Afrika):

<https://www.youtube.com/watch?v=Hb4qUsbYhfM>

"Se vi parolas al homo en lingvo, kiun li komprenas, tio iras al lia kapo. Se vi parolas al li en lia lingvo, tio iras al lia koro". (Nelson Mandela)

Amike, Alvaro Motta, Esperano Rio de Janeiro <[alvaromotta@gmail.com](mailto:alvaromotta@gmail.com)>

Oficiala ret-paĝo de RIO+20: <http://www.uncsd2012.org/rio20/>

Portugala ret-paĝo de RIO+20: <http://www.rio20.info/2012/>

Ret-paĝo pri la alternativa evento Kúpula dos Povos: <http://cupuladospovos.org.br/>

= =

2016-06-04 La 35-a de Majo 1989 - Placo de la Ĉiela Paco - Civila Engaĝigho  
Ghis nun nur en Honkongo eblas diskuti pri la mortpafado kontraŭ manifestaciantaj studentoj (se temas pri PR Ĉinio).

Tiaj manifestacioj okazis ne nur en komunismaj landoj sed ankaŭ en aliaj. Bedaurinde ofte ili estis dispelitaj aŭ pripafitaj de ŝtataj aŭ mafiecaj milicoj.

Tian-an men estas nur ekzemplo ke koruptaj aŭ absolutaj registaroj ne emas ke civitanoj enmiksighas en la politiko.

Sed por sukcesplena jurshtata regado bezonatas la kontrolo fare de la publiko, gazetaro kaj similaj amasmedioj.

Gravas, ke iam iu ajn aktuala registaro pretas malfermigi la arkivojn kaj malferme diskuti publike kial kio okazis, kaj kiu kiamaniere kulpis; kaj eble ricevos punon.

Socio kiu ne povas paroli pri tiaj okazajhoj ne lernas kaj similas morta socio.

= =

2016-05-27 Rusia balotado / Raporto el la Krimeo

Kalle Kniivilä verkis 2015 „Krimeo estas nia“ la rezulton de denova vizito en Krimeo – nun rusia.

Li intervjuis multajn personojn de diversaj etnoj kaj diversaj politikaj flankoj. Ghi donas bonan rigardon en la okazajho de la alpreno de Krimeo flanke de Rusio.

Lia verko „Homoj de Putin“ indas legi por pli bone kompreni kio okazas en la rusa imperio.

Mikhajl Khodorkovski raportas pri la antau-elektoj de la reganta partio „ER“ en Rusio je la 22a de Majo. Li reportis pri fraudaj metodoj, kiel karuselo.

[http://www.khodorkovsky.com/the-tsar-is-too-far-away/?utm\\_source=The+Open+Wall&utm\\_campaign=6bcc6ee62c-ow48\\_Test15\\_11\\_2016&utm\\_medium=email&utm\\_term=0\\_12f97c898a-6bcc6ee62c-429383629](http://www.khodorkovsky.com/the-tsar-is-too-far-away/?utm_source=The+Open+Wall&utm_campaign=6bcc6ee62c-ow48_Test15_11_2016&utm_medium=email&utm_term=0_12f97c898a-6bcc6ee62c-429383629)

Jen la raporto de la germana ekonomia jhurnalo „Handelsblatt“ kun similaj informoj.  
[http://de.rbth.com/politik/2016/05/26/generalprobe-erstmals-vorwahlen-in-russland\\_597499](http://de.rbth.com/politik/2016/05/26/generalprobe-erstmals-vorwahlen-in-russland_597499)

--

2016-05 La prezidento de Turkio tendencas kolekti la tutan decidpovon al si mem. Aktuale li klopodas eljheti grandan kvanton da parlamentanoj. Aparte tiujn de HDP, kiu tradicie defendas la kurdojn. Tiel ili estas „teroristoj“, char nuntempe Turkio estas denove en milito kun la PKK.

Intertempe la nombro da turistoj el Rusio, Germanio, Britio k.a. kiuj vizitas Turkion reduktighis je triono.

Tio estas tute koncize – bonvolu legi pli che:

Auskultebla en la germana: <http://www.deutschlandfunk.de/wirtschaft-und-gesellschaft.768.de.html>

Pli pri la temo de deflankigho de jur-shato all prezidenta shtato legeblas en pluraj lingvoj sur vikipedio.org, ekz-e se vi serchas „HDP“.

==

2016-05-16 La nova filipina prezidento Duterte akriigos la punojn ghis mort-puno denove.

Samtempe Filipinoj kaj najbaraj landoj estas ghenataj/minacataj de P.R. Chinio kiu klopodas etendighi en la suda maro. (lau TV elsendo de ARD.de)

--

2016-05-16 La turka prezidento pli kaj pli militas kontrau kurdoj

Kiu kritikas lin estas kvazau teroristo. Li intencas shanghi la konstitucion, lau kiu palamentanoj perdus sian imuneco-statuson; kaj sekve 136 parlamentanoj, inter ili 50 de la 59 el la HDP, kiu estas pli afabla rilate la kurdoj, povus perdi sian seghon/mandaton. (lau TV-elsendo ARD.de)

Komento AVE/mw: Ne imageble estas ke lando kun tia prezidento ighos membro de EU. Malgrau tio EU opinias, ke indas pagi ch. 3 miljardejn EUR al Turkion por for-teni la rifughintojn.

--

2016-05 Pollando mallarghighas politike – kaj malproksimighas de EU.

La pola radio (bedaurinde ne plu en Esperanto) sendis intervjuon kun 2 junaj viroj, kiuj ne plu vidas bezonon de membreco en la komunumo de EU.

Dank' al gigantaj subvencioj el EU-kasoj la lando nun tiom evoluighis, ke la registaro kaj sekve de tio aliaj civitanoj opinias, ke ne plu bezonatas tiu kateno, kiu deprenas parton de la suvereneco. Fakte en 2014 Pollando ricevis nete 13,7 miljardejn EUR; aliflanke Germanio pagis nete 15,5.

[www.bpb.de/wissen/P16RQL,0,Top\\_5\\_Nettozahler\\_und\\_Nettoempf%EA4nger\\_der\\_EU.html](http://www.bpb.de/wissen/P16RQL,0,Top_5_Nettozahler_und_Nettoempf%EA4nger_der_EU.html)

Komento mw: Tamen indas viziti la landon kiel turisto – kion ni faros.

--

2016-05 La televidkanalo ARTE elsendis tre interesan dokumentfilmon ĉe la vojkruciĝejo inter psikologio, neŭrosciencoj, antropologio. De 20 jaroj, sciencistoj faras eksperimentojn sur la kampo de psikologio kaj neurosciencoj por prikonturi la homan naturon kaj testi la furoran tezon, ke homo estas nature egoista. Ĉu kunlaboremo estas rezulto de la biologia evoluado? "Homo kondutas kiel lupoj al homo": la monda historio ŝajnas verkita por illustri tiun proverbon. La lastatempaj malkovroj ebligas inventi la vorttrezoron de tute alia rakonto. Se altruismo ekzistas, ĉu eblas ĝin kultivi? El la perfortaj kvartaloj de Baltimoro ĝis Nepalo tra Germanio, Sylvie Gilman kaj Thierry de Lestrade iris renkonti sciencistojn por skizi, surbaze de iliaj malkovroj, novajn solvojn por kuraci la malbonfarton de la planedo, tiel kontraŭantaj la nuna ĉiea pesimismo. Tiu ĉi dokumentfilmo desegnas novajn sekvindajn vojojn por agi sur la kampo de edukado en lernejoj. Ĉu ŝanĝi nian cerbon ebligus ŝanĝi la mondon? Kondiĉe ke oni kalkulu kun tiuj novaj malkovroj, mi opinias ke ili prilumas per iom da espero la antaŭeniron de la historio de la 21a jarcento, je horo kiam la demando pri la postvivo de la homaro stariĝas. La dokumentfilmo spekteblis je: germane [Die Revolution der Selbstlosen](#)

france [Vers un monde altruiste?](#)

--

## **Plastaj mondcivitanaj legitimkartoj**

La Mondcivitana legitimkarto estas de nun havebla [el plasto](#), (kun sama formato, kiel banka karto)

Tiu karto estas tre fortika, nefalsebla, neimitebla.

La posedantoj de "tradicia" karto (el kartono) povas akiri la novan karton kontraŭ 5 Eŭroj (Vi bonvolu indiki la numeron de via legitimkarto).

Por tiuj, kiuj ne posedas la mondcivitanan legitimkarton, la prezo estas 20 Eŭroj (malaltiĝo de la prezo ebla ĝis 13 Eŭroj).

Ec ĉiuj okazoj, nepre plenigu [formulon](#), kaj aldonu freŝdatan **legitimfoton**.

Pri la pago, vidu la eblecojn en paĝo :<http://www.recim.org/cdm/pag-eo.htm>

La simpla enregistriĝo (sen karto) estas senpaga.

## **2016-04-20 – Molenbeek / Bruselo – Unua interreligia futbalturniro**

*Je la iniciato de la grupo “Kune pace” (Together in Peace) pli ol 100 gejunuloj katolikaj, musulmanaj, protestantaj, judaj fulbalis sur ĉefa publika placo de Molenbeek. Ili estis inter 15-21 aĝaj kaj partigitaj inter 20 teamoj en kiuj estis anoj el diversaj religiaj grupoj; ankaŭ junulinoj partoprenis.*

*Substrekinda estas la fakto ke cheestis ankaŭ imamo, pastro, rabeno kaj pastoro.*

*En la kolektivo “Kune pace” trovighas la Eklezio anglikana, la Konferenco de la katolikaj episkopoj, la Konsistorio centra izraela, la Ekzekutivo de la musulmanoj, la Sinodo federa de la protestantaj kaj evangeliaj eklezioj, la Ĉefepiskopoeco ortodoksa, la Eklezio protestanta unuigita kaj la Unio de la eksterreligiaj asocioj. (informo dank' al Germain Pirlot)*

==

2016-04-23 Wroclavo/ Breslau - kvartalo de reciproka respekto inter religioj

Ni chiuj timas la militadon, kaj ni albone komprenas se temas pri batalo, mortigo, torturado pro la „ghusta religio“. Jam de jarmilo(j) okazis tiaj ne-humanecaj bataloj. Jes ja, ofte la chefa temo estis la povo – kiu regas en la teritorio. Sed la homojn oni (la povuloj) instigas pere de religiaj argumentoj.

Feliche pli kaj pli okazas interreligiaj dialogoj.

Hodiau matene en kristana radioelsendo mi audis pri ege bona ekzemplo en la Kultura Chefurbo de Eruopo, Wrocław (Vroclavo, germane Breslau). En unu kvartalo la 4 religiaj komunumoj, kies preghejoj trovigas en la sama strato decidis kunlabori:

la juda, ortodoksa, protestanta kaj katolika; oni interesigas pri la kredo kaj komune festas religian vivon.

Leo Tolstoj iam skribis belan rakonton pri tio: blinduloj palpas po unu parton de elefanto, kaj chiu „vidas“ ion alian. Tolstoj diras: la (religia) vero ankau havas tiom multajn erojn, ke ne eblas ekkoni 100%e la veran (kompletan) bildon pri la ne-videblaj aferoj.

Se ni aspektas chiujn „religiojn“ – diecajn au filozofiajn – samrange; tiamaniere la povuloj ne povas uzi religion kiel armilo.

Chu same vidis Zamenhof kaj kreis la homaranismon ?

- - -

2016-04-19 Israelo survoje al unu-shtato

Vi certe legis pri la multaj agadoj de la israela(j) registaro(j), finverki la re-posedadon de la iama juda teritorio. Kiu lau la biblio iam apartenis al alia popolo, la Kanaananoj.

Malgrau la kontraktoj de Oslo, kiu decidis 3 teritoriojn (A,B,C) por la araba popolo (Palestinanoj), la registaro sendas (au lasas) setlantojn, kaj ege ghenas la arabojn en tiu parto.

La araboj nun batalas per tranchiloj; sed tio ne helpas, se la mondo (UN) ne decidas kaj zorgas pri tio, ili ne havos shancon al propra teritorio.

(ekz-e: Rene Wildangel, germana versio de Le Monde Diplomatique 2016/Marto, p.19)

Komento AVE/mw:

Mi esperas ke en tiu Grand-Israelo judoj kaj araboj estu samrajtaj, ke la shtato respektas la proprajhon je oliv-arboj, posedrajto je tereno, kaj zorgas ke ankau araboj kaj aliaj etnoj estas plenrajtigitaj civitanoj.

==

2016-04 Europo malhumanece traktas rifughintojn

En multekosta kontrakto kun la turka prezidento EU trovis helpanton bremsi la rifughintojn. La agado estas iom komplika, multaj CSO-oj opinias, ke per la sama mono oni povus subteni la rifughintojn sen nutri la maldemokratian prezidenton Erdogan.

2016-04 Putin & Erdogan & Assad – diversaj flankoj

La prezidento de Turkio Erdogan evidente ne shatas kritikon kaj senindulge batalas kontrau la kurdoj en sia lando. Aliflanke li amas sian belegan, novan Blankan Palaston, kiu kostis 490 milionoj da Euroj – informoj troveblaj en [wikipedia.org](http://wikipedia.org).

De la rusa prezidento Putin oni legas pri mon-lavado de sia chirkauajho en granda stilo, nomumita „Panama Papers“. Pere de poshtkestaj firmaoj kaj la violonchelista Sergej Roldugin el Sankta Peterburgo oni movis grandan monon (preskau miljardon da USD).

Lau <http://www.tagesschau.de/ausland/panamapapers-131.html>

kaj de la verdpastia specialisto en la Europa Parlamento pri kash-mono <http://www.sven-giegold.de/2016/panama-papers-sanktionen-fuer-die-helfer-von-steuerfluechtlingen/>

La sola pozitiva novajho pri Rusio: finfine la rusa armeo kune kun la restoj de la Siria sukcesis rebati la t.n. Islaman Shtaton el Palmyra kaj chirkauajho.

Bedaurinde Erdogan pli malshatas la kurdojn ol tiujn teroristojn.

==

2016-02-03 Algherio donas la lingvan rajton al la berberoj uzi Tamazight

Okaze de la plia demokratiigo de la lando, tiu regiona lingvo ighas nacia kaj oficiala lingvo de Algherio.

(germane) <http://www.heise.de/tp/artikel/47/47343/1.html>



==

### 2016-02 **Kio estas Demokratio ?**

Demokratio bezonas plurajn antaŭkondichojn:

- dividitaj povuloj: justico, legislativo, registaro kiu subtenas la bonan evoluon, kaj havas la povo-monopolon
- plurisma ĵurnalismo, gazetoj, televido, kiu povas malkaŝi koruptajn aferojn
- engaghitaj civitanoj: fajfuloj, blogistoj, Greenpeace, AI, partioj kiuj estas sendependaj de richuloj (pro tio en Germanio ili ricevas monon (laŭ la procentaĵo) de la ŝtato por ilia agado)

UEA eldonis libreton pri tio „Kio estas Demokratio ?“ , kiu detale priskribas la bazajn kondichojn kaj diversajn manierojn vivi demokration.

Mi ankoraŭ ne trovis chapitron: „kiel atingi demokration ?“

- - -

### 2016-02-07 **Kiel solvi la Sirio-problemon ?**

Carlo Masala, fakulo pri milit-strategio, diris hodiaŭ en (dradio.de) ke la 3 ĉefaj roluloj en Sirio estas:

1. Assad kaj la Alavitoj (parencaj al la shia-islamoo), kune kun Putin, kies rekta intereso estas la rusa milit-haveno Latakia; krome mem havas problemon kun islamistoj en la Kaukaza regiono. Sed rusaj milit-aviadiloj ĉefe bombadas la regionojn, kie aktivis la ribeluloj kontraŭ la despotismo de Assad. Pro tio nun fuĝas miloj da homoj el Aleppo al Turkio.

2. la kurdoj, kiuj delonge volas havi propran teritorion, ĉar ili estas subpremitaj aparte de la turkaj registaroj. Ili plej kuraghe kaj intense batalis kontraŭ la etendighinta Islama Ŝtato.

3. la sunnitoj, kiuj ludis la duan rangon en la Assad-ŝtato, subtenataj de Saudi Arabio kaj la t.n. Islama Ŝtato.

Masala diris, ke neniu grupo finos militi, dum ili vidas eblecon pligrandigi sian teritorion. Do, la traktatoj en Ghenevo havos la taskon el-balanci kiun parton ĉiu grupo bezonas minimume, kaj marchandi en tiu direkto.

[http://www.focus.de/politik/experten/masala/krieg-in-syrien-drei-gute-gruende-warum-man-mit-assad-verhandeln-muss-und-ein-vorschlag-worueber\\_id\\_5044546.html](http://www.focus.de/politik/experten/masala/krieg-in-syrien-drei-gute-gruende-warum-man-mit-assad-verhandeln-muss-und-ein-vorschlag-worueber_id_5044546.html)

Demandoj: Evidente, kaj dank al Rusio, Assad ne malaperos en mallonga tempo. Ĉu la ribeluloj, kiuj vivis en la regiono de Assad, povos reveni tien, sen esti persekutata de la reĝimo.

Se la IS (Da-esh) regos en la sunnita regiono, kiu emos vivi sub la jugo de ili ?

Mia komento: kial ni (la „okcidento“, Usono, EU) instigis (morale subtenis) la ribelon kontraŭ Assad, se ili jam sciis, ke ili ne faros sur-teran (kontraŭ-leĝan) militon kontraŭ Assad por defendi la demokratajn ribelulojn ?

Do, la kulpo pri tiu milito rilatas plurajn registarojn.

= =

### 2016-01-31 **Rusaj ruzaj Fabeloj**

Infanoj petas la avinoon rakonti fabelon – bone, kaj necese por la evoluo de ilia homeco. Aliaj homoj rakontas fabelojn ech al plenkreskuloj, ech sen diri ke temas pri fabelo – malbone, ĉar bedaŭrinde multaj kredas tion, kaj tiiras siajn konkludojn.

La rusa ŝtato evidente okupigas tutan stabon da libervoluloj – kiuj ja bezonas monon por vivi dece - por elpensi fabelojn, kaj por disvastigi ilin.

Jen la plej lastaj fabeloj de Viktoria Shmit el Hanovro, kiu timas ke ĉie troviĝas

agresemaj rifughintoj, pri kiu ŝi parolas en la rusa TV-serio Svesda (14-a de Januaro).

Je la 16-a de Januaro „informis“ pluraj rusaj elsendo-medioj pri malaperigo kaj perforto kontraŭ 13-jara rusdevena knabino Lisa en Berlino. Ech la rusa eksterlanda ministro Lawrow kredis tion (ĉu li ne konas la kutimojn en la Kremlo ?). Kaj oni per fivortoj pafis kontraŭ la germana kancelierino.

Kelkajn tagojn poste la prokuraturo de Berlin eltrovis ke shi kashighis je konatulo pro lernejoj problemoj. Jen la koncernaj ligiloj:

<http://www.faz.net/aktuell/politik/russlands-informationskrieg-unser-maedchen-lisa-14043618-p3.html>

ankau eblas informighi je: [stopfake.org](http://stopfake.org) au [noodleremover.news](http://noodleremover.news)  
(lau xy, taz, 2016-01-05)

= =

2016-01-24 Homaj Rajtoj 2016 - mortpuno

Finfine estighis granda skandalo kiam Saudi Arabio ekzekutis la shiitan klerikulon Nimr al-Nimre, char li kritikis la reghan politikon. La shiita mondo akre protestis.

Dum unu jaro Irano (79 mio enloĝantoj) ekzekutis 852 homojn, kaj Saudi Arabio (30 mio) ekzekutis 152; do, en Irano estis relative pli da ekzekutoj.

En landoj kie validas la sharia-justico okazas ekzekutoj jam pro malgravaj kontrau-tradiciaj misfaroj; kaj kutime ne okazas sendependaj esploroj; ekzemple kiam temas pri t.n. blasfemio.

Ankorau en pluraj aliaj landoj okazas ekzekutoj, parte oni ekzekutas sen verdikto - ekzemple en la nunaj hibridaj militoj.

Anna Politkowskaja estis murdita (2006-10-07) same kiel aliaj rusaj jhurnalistoj au kritikantoj de la registaro. La iama sekretulo Litwinenko sekvis inter alie la spurojn de tiu murdo, kaj estis kruele murdita komence de Novembro 2006 pere de Polonio-210, radioaktiva substanco (kaj mortis la 21-an). La fina jughraporto (2016-01-21) de jughisto Sir Owen montris ankau al la rusa prezidento Putin kiu „vershajne akceptis“ tion.

Feliche en Usono la nombro da ekzekutoj reduktighis al 28 en 2015, ni esperas la finon de tiu arkaika puno - kiu ne helpas al la socio.

Ni esperas, ke la mortpuno entute finos.

Fontoj: vi trovos la informojn en [vikipedio.org](http://vikipedio.org), parte en Esperanto.